

Otto Julius Bierbaum,
Amletero

*tradukita de Paul Benne-
mann*

En malproksimon for,
super la montojn for,
trans ĉiujn tagojn kaj nok-
tojn for
kantas mi al vi, amatino –
aŭdu min!

Aŭdu susuron de l' arboj
en pluvo;
aŭdu la venton tuŝantan la
herbejon
per karesa flugilo ŝvebante;
aŭdu obtuzan ĝemon de l'
nokt':
aŭdu vin mem –

Aŭdu kun revaj okuloj;
aŭdu,
aŭdu en vi muĝantan la ko-
ron
kaj vian sangon:
ĝi portas mian voĉon
kaj mian amon tra tuta via
vivo.
Al vi, pro vi sonas voko;
krio de plena animo
serĉas vin, amatino – aŭdu
min!

En malproksimon for,
super la montojn for,
trans ĉiujn tagojn kaj nok-
tojn for
kantas la kor', amatino,
kantas la koro al vi!

...

Otto Julius Bierbaum,
Liebesbrief

Über die Ferne hin,
Täler hin, Berge hin,
Durch alle Tage und Nächte hin,
Sing ich zu dir, o Geliebte.
Hörst du mich?

Lausche dem Rauschen der
Bäume im Regen,
Lausche dem Winde, der über die
Halme
Mit dem zärtlichen Fittiche hin-
streift,
Lausche dem holden Munde der
Nacht;
Lausche in dich.

Lausche geschlossenen Auges,
höre,
Höre dein Herz, das rauschende,
höre,
Höre dein Blut: es trägt meine
Stimme,
Trägt meine Liebe durch all dein
Leben:
Zu dir, um dich
Tönt mein Rufen,
Tönt meine sehnsuchtsvolle Seele,
Die dich sucht.

Über die Ferne hin,
Berge hin, Täler hin,
Durch alle Tage und Nächte hin
Sing ich zu dir, o Geliebte,
Singt meine Seele zu dir.

...

Otto Julius Bierbaum,
Liebesbrief

tradukita de Manfredo Ratislavo

En malproksimon for,
Super la montojn for,
Trans ĉiujn tagojn kaj noktojn
for
Kantas mi al vi, ho amatino.
Ĉu vi aŭdas min?

Aŭskultu la susuron de l' arboj
en pluvo;
Aŭskultu la venton, kiu super la
gren-tigoj
Per karesa flugilo ŝvebas;
Aŭskultu la ĉarman parolon de
l' nokto:
Aŭskultu vin mem.

Aŭskultu kun fermitaj okuloj;
aŭdu,
Aŭdu vian muĝantan koron
Kaj vian sangon: ĝi portas mian
voĉon,
Ĝi portas mian amon tra tuta
via vivo:
Al vi, pro vi
Sonas mia voko,
Sonas mia sopirplena animo,
Kiu vin serĉas.

En malproksimon for,
Super la montojn for,
Trans ĉiujn tagojn kaj noktojn
for
Kantas mi al vi, ho amatino,
Kantas mia animo al vi.

...

Traduko de la Germana poemo "Liebesbrief" de OTTO JULIUS BIERBAUM (*1865-06-28 - †1910-02-01) en Esperanton de PAUL BENNEMANN (*1885-03.13 - †1954) en 1933.

Arg-525-1034 (2013-04-10 15:40:33)

Tiu ĉi Esperantigo de la poemo troviĝis presita en la revuo „Heroldo“, n-ro 40 (745) de l' 8a de oktobro 1933. Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Bennemann

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas OTTO JULIUS BIERBAUM (*1865-06-28 - †1910-02-01).

Arg-525-1033 (2010-03-03 16:31:32)

Das Gedicht ist zu finden unter <http://www.deutsche-liebeslyrik.de/bierbaum.htm#g43>

und <http://www.zeno.org/Literatur/M/Bierbaum,+Otto+Julius/Gedichte/Ausgew%C3%A4hlte+Gedichte/Gemma/Zwei+Liebesbriefe/1.+%5B%C3%9Cber+die+Ferne+hin%5D>.

Hinsichtlich des Verfassers siehe: http://de.wikipedia.org/wiki/Otto_Julius_Bierbaum.

Traduko de la Germana poemo "Liebesbrief" de OTTO JULIUS BIERBAUM (*1865-06-28 - †1910-02-01) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2010-03.01.

MR-492-01 / Arg-525-1035 (2010-03-05 10:20:30)

La unua Esperantigo de la poemo troviĝis presita en la revuo „Heroldo“, n-ro 40 (745) de l' 8a de oktobro 1933. Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Bennemann. Mi, Manfred Retzlaff, provis traduki la poemon denove; ĉar mi pensas, ke la traduko de Paul Bennemann (13.03.1885 - 1954) ne sufiĉe agordas kun la originalo.